Projekto pri reorganizo

Por solvi la krizon, pro kiu lastatempe demisiis preskaŭ duono de la Komitato, ĉu insisti pri la neeblo, ke kelkaj el la nunaj kandidatoj kune laboru en la venonta Komitato? Prefere, por ne perdi nian historian heredaĵon, oni konstruu malutopian transiron inter periodo de nura volonteco, eĉ se dank' al tio la Kastelo supervivis siajn malfacilaĵojn post 1998, kaj administrado pli kongrua al nia aktuala mondo. Unuavice, oni rekreu fidindan etoson, allogu staĝanojn per pli vasta diskonigo de kastela agrableco, ĉirkaŭaj vidindaĵoj, intereso de la staĝoj, kaj plej bone utiligu la efektivan disponeblecon de ĉiu komitatano. Oni plej bone dispartigu la taskojn: unue, ĉiu estu respondeca pri siaj decidoj, kadre de klare difinitaj taskoj; due, kelkajn oficojn plenumu homoj kaj ne komisionoj: oni elektu prezidanton, kiu kapablu arbitracii malakordojn; pedagogian direktoron por dungi kaj taksi la instruantojn; respondeculon pri eventoj, komisiita prizorgi ĉian peton uzi la kastelon krom por niaj propraj staĝoj; la rolojn de la staĝestroj kaj de la kastelestro oni klare difinu, ktp…

Post la jura reagnosko de nia societo, kiu sukcesu kiel eble plej rapide, eble necesos elekti administranton kaj precizigi ties funkcion. Oni krome pristudu, kiel evoluigi la juran statuson de la Societo. Antaŭ ol plani pezan strukturon kun salajratoj, gravas pli bone disigi la administradon de la kastelo mem, kiu postulas surlokajn kunvenojn, disde la organizado de aranĝoj kiu plejparte eblas de malproksime. Gravas esti videblaj en la Esperantistaj kaj ne-Esperantistaj gazetaroj kaj renkontiĝoj, kaj atentemaj al la deziroj de niaj eblaj klientoj. Ni ne vivtenos tian kastelon per nur kelkaj semajnoj jare de Esperanto-staĝoj.

Renovigon de la kastelo oni konsideru kiel prioritaton, sed pri tio decidos ĉefe la Ĝenerala Membro-kunsido, ne la Komitato. Laŭ mi, necesos prilabori plurjaran planon pri: hejtigado de la tuta kastelo por malfermi ĝin en iu ajn sezono, aldono de duŝoj, inkluzive interne de kelkaj ĉambroj, kreado de kromaj ŝtuparoj devigaj por okupi la duan etaĝon, pli bona aranĝo de apudaj konstruaĵoj, plibeligo de salono Zamenhof, faciligo de eksteraj aranĝoj en la korto kaj sur la herbejo…

Projet de réorganisation

Ce n'est pas en mettant en avant le caractère inconciliable des points de vue exprimés par les candidats susceptibles d'être élus ensemble dans le prochain conseil d'administration qu'on résoudra la crise qui a conduit récemment près de la moitié du Conseil d'Administration à démissionner. Pour ne pas perdre ce patrimoine historique qu'est la Maison Culturelle de l'Espéranto, l'important est de construire une transition réaliste entre le pur bénévolat, même s'il a permis au château de survivre à ses difficultés de 1998, et une gestion plus ouverte sur les réalités de notre époque. Tout d'abord, recréer un climat de confiance, attirer les stagiaires en faisant davantage connaître les attraits du château et de sa région, la qualité des stages, et utiliser au mieux la disponibilité effective de chacun des administrateurs. Il faut optimiser la distribution des tâches : d'une part, rendre chacun responsable des décisions qui lui incombent, dans le cadre des missions bien délimitées qui lui auront été confiées ; d'autre part, éviter la collégialité de certaines tâches : choisir un président capable d'arbitrer les différends, un directeur pédagogique pour recruter et évaluer les enseignants, un responsable des événements chargé de répondre à toute demande d'utilisation du château autre que pour nos stages, bien définir les prérogatives du chef d'intendance et des directeurs de stages, etc…

Après la régularisation juridique, qui doit aboutir dans les plus brefs délais, nous serons vraisemblablement obligés de choisir un gérant, en spécifiant son rôle. Il faudra également s'interroger sur une évolution possible de la structure. Avant d'envisager une structure lourde avec des salariés, il importe de mieux dissocier la gestion du château lui-même, qui impose des réunions sur place, de l'organisation des activités qui, pour l'essentiel, peut se faire à distance. L'important est d'être présents dans la presse et les rencontres espérantistes et non espérantistes, à l'écoute des attentes de nos clients potentiels. Quelques semaines par an de stages d'espéranto ne suffiront pas à entretenir un tel château.

Un des principaux dossiers est donc la rénovation du château, mais les décisions essentielles seront prises par l'Assemblée Générale et non pas le Conseil d'Administration. Selon moi, il faut prévoir, sur plusieurs années, de chauffer tout le château pour pouvoir l'ouvrir à n'importe quelle date, d'ajouter des douches, y compris à l'intérieur de certaines chambres, de concevoir des escaliers permettant d'occuper le deuxième étage, de mieux aménager les dépendances, embellir la grande salle, favoriser l'utilisation des abords du château pour des événements en plein air…